Thomas Moore,

# Ofte en paca nokt'

*tradukita de Paul Bennemann*

Ofte en paca nokt',
se dormo ne min prenas,
pri la pasintaj tagoj
rememoro venas:
pri ridoj, larmoj ama vort',
al juna knab' dirita,
pri belokul', senluma nun,
Tiel en paca nokt'
pri koro, jam rompita.,
se dormo ne min prenas,
pri la pasintaj tagoj
rememoro venas.

Kaj la memoro pri
amikoj formortintaj,
kiel folioj en
malvarma vent' falintaj.
ĝi igas senti, kvazaŭ mi
ĉe fest' dezerta sidas:
la gastoj for, —
mortinta lum',-
velkinta flor' dancglitas.
Tiel en paca nokt',
se dormo ne min prenas,
pri la pasintaj tagoj
rememoro venas.

*Traduko de la Angla poemo "Oft in the stilly night" de* Thomas Moore *(∗1779-05-28 – †1852-02-25) en Esperanton de* Paul Bennemann *(∗1885-03.13 – †1954).*

*Arg-841-1693 (2013-02-25 22:45:33)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipedian retejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Bennemann